

Esperanto kiel araba-juda lingvo de paco, 1924-1948

Resumo

El plej disaj informeroj de la jaroj 1924 ĝis 1948 reliefigas surpriza fenomeno: Esperanto servis ne nur kiel ponto-lingvo, sed eĉ kiel lingvo de frateca kunlaboro inter judoj kaj araboj. Ju pli profundigis la esploro, des pli klara iĝis la bildo – en du sferoj: la bonaj kontaktoj inter la judoj de Palestina Esperanto-Ligo kaj la araboj de Egipta Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ la kunlaboro de judoj kaj araboj ene de tiuj du unuopaj asocioj.

* * *

La perspektivo, kiun prezentas la tempopaso, ebligas percepti disajn eventojn kiel fenomenon. Jen, kiu kredus, ke Esperanto ne nur servis iam kiel paca lingvo inter araboj kaj judoj en la Mezoriento, sed eĉ, ke dum la koncerna periodo la roluloj mem rilatis al ĝi tute nature, neniam prezentante sian amikecon kiel ion eksterordinaran?

Tamen, estas ĝuste la tempopaso, kiu tramordis informerojn, postlasante nurajn fragmentojn, penege kolektitajn. Eĉ ne plu vivas iu el la protagonistoj: la lasta ebla atestanto forpasis en 2002¹. Despli singarde, do, ni prenu sur nin la taskon alkroĉiĝi ekskluzive al dokumentoj kaj eviti supozojn, traktante tiun fascinan temon.

La komenco

La unua informo pri komuna araba-juda agado por Esperanto venas el la Tel-Aviva Esperanto-societo en 1924, kiu meritis sian nomon “Paca Stelo”², ĉar en ĝi membris kune judoj kaj araboj (estis nur tri jarojn post kruelaj atakoj de araboj kontraŭ judoj en la najbara araba urbo Jafo). Kvindek kvar jarojn poste la juda pioniro Josef Ravikov memoris inter la dek homoj aperantaj sur foto en lia posedo la araban nomon Arafat, kaj alian araban de Jafo. Tio igis Aleksander Manor esprimiĝi en artikoleto: “Tio hodiaŭ sonas kvazaŭ kiel fabelo, ke la araba aktivulo, kiu propagandis la Internacian Lingvon inter la Araboj en Jafo estis Arafat, la onklo de Jaser Arafat, la hodiaŭa ĉefo de P.L.O., araba terorista organizo, kies celo estas detruiri Israelon.”³

Du jarojn poste, en Bejruto, Libano, sekve de “rekta propagando de Internacia Centra Komitato”, esperantistiĝis rondo de divers-naciaj instruistoj, inter kiuj judo kaj arabo, kaj krome i.a. persio, armeno, amerikano, franco kaj anglo. La revuo *Esperanto* anoncis: “Grupo baldaŭ estos formata.”⁴

La ideo, kiu hodiaŭ sonas (tro) grandioza, okazigi “Mezoriantan Esperantistan Konferencon” naskiĝis la 20-an de januaro 1934, dum la dua tutlanda kunveno de Palestinaj

¹ Jerahmiel Giladi, forpasinta 94-jara, agadis por la tiama Palestina Esperanto-Ligo (PEL) post sia enmigro en Palestinon en 1929. Egipta Esperanto-Asocio jam delonge ne ekzistas, kaj ĉiuj ties agantoj, sufiĉe aĝaj eĉ tiam, forpasis antaŭ jardekoj.

² Aliloke troveblas kiel nomo de la Tel-Aviva asocio: “Konkordo” (Kohen-Cedek 1969: 3-6).

³ Manor 1978: 2. Estus prudente trakti skeptike la aserton, ke s-ano Arafat estis onklo de la prezidanto de Palestina Liberiga Organizo (PLO). La patrino de Jaser Arafat devenis el Jerusalema familio, kaj la familio de la patro vivadis en Egiptio. Mi trovis nek pruvon nek malpruvon pri la sensacia aserto de Manor. Kurioze, PLO iam uzis Esperanton en propaganda broŝureto *Ĉu vi scias? Dudek bazaj faktoj pri la palestina problemo*, de Fayeze A. Sayegh, trad. Husen Al-Amily, Beirut: PLO 1967.

⁴ *Esperanto*, vol. 22, 1926, n-ro 7, p. 144.

esperantistoj⁵. La anoj de Palestina Esperanto-Ligo (PEL) rapidis sendi al Edmond Privat, la redaktoro de *Esperanto*, longan invitartikolon kun bildoj⁶.

La Mezorianta Esperantista Konferenco, aŭ “Kongreso” laŭ la artikolo en *Esperanto*, okazis de la 10-a ĝis la 12-a de majo 1934, kadre de la kvara Orienta Foiro en la juda urbo Tel-Avivo. Tiu Foiro estis internacia ekspozicio kaj ĉefa jara allogaĵo de la urbo. La Kongreso altiris 100 ĉeestantojn, inkluzive de multaj eksterlandaj gastoj, inter ili el Egiptio.

En la foirejo estis oficiala pavilono de Esperanto, kiu altiris multajn homojn. Al la kongresanoj paroladis la estro de la Orienta Foiro, tiam konata poeto Imanuel Harusi. La duan tagon tagmeze okazis la solena inaŭguro de la “unua Zamenhof-strato en la Mezoriento”, far la unua urbestro de la nova urbo Tel-Avivo, Meir Dizengof, kiu paroladis varme kaj longe pri Zamenhof⁷.

En la laborkunsido estis pritraktata la neceso kaj eblo de kunlaboro inter la esperantistoj de la Levantenaj (Proksim-Orientaj) landoj. Fine la kongresanoj pasigis adiaŭan vesperon en marborda kafejo kun la pitoreska nomo “Neĝo de Lebanono”⁸.

La okazintaĵo plivigligis la poresperantan agadon en Palestino, sed “nova periodo de malpacajoj (1936-38) bremsis la laboron”⁹. Tiel Josef Kohen-Cedek seke aludas al periodo de sennombraj atakoj de arabaj bandoj kontraŭ juda loĝantaro, reage al la plivastigita juda enmigrado en Palestinon, atakoj kiujn la britaj regantoj ne sukcesis haltigi. Dum tiu periodo la ĉiutaga vivo en Palestino estis parte paralizita.

Tiu sama periodo, pli-malpli, ne estis bonaŭgura ankaŭ por la Egiptia movado: Kvankam inter 1933 kaj 1935 agadis en Egiptio la konata angla esperantisto L.N.M. Newell¹⁰, kaj poste Moussa Helmi, kiu gvidis kelkajn kursojn, la movado dormis ĝis 1940. Ekde tiam okazis nur loka agado en Aleksandrio kaj Ismailia, ĝis la refondo de Egipta Esperanto-Asocio (EEA) en 1944¹¹.

En 1942, kiam en Palestino necesis pretigi novan studmaterialon, la juda ĉefaktivulo B. Ĥavkin aperigis stencile du samtempajn eldonojn de la Zamenhofa *Ekzercaro*, en hebrea kaj araba lingvoj. La hebrelingva estis kun gramatiko kompilita de J. Kohen-Cedek kaj vortareto de N.Z. Maimon, la arablingva profitis de jud-araba kunlaboro: la judo prof. Naĥum Braun okupiĝis pri la gramatiko, la arabo J. Randour pri la vortareto¹². Tiu Randour¹³ iĝis la postan jaron fakdelegito de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) en Palestino, pri arabaj aferoj¹⁴.

Kaj dume en Egiptio, Tadros Megalli, arabo-kopto, fakdelegito de IEL pri metafiziko kaj vegetarismo¹⁵, daŭre organizis kursojn por militistoj, ĉefe el Novzelando kaj Britio. Foje

⁵ Kohen-Cedek 1976: 10 kaj 13.

⁶ J. Kohen-Cedek, “La Levanto-Foiro en Tel-Aviv”, en: *Esperanto*, vol. 30, 1934, n-ro 4, p. 60-61.

⁷ “Kongresoj: Unua Proksim-Orienta”, en: *Esperanto*, vol. 30, 1934, n-ro 6, p. 100.

⁸ Vd. noton 7.

⁹ Kohen-Cedek 1969: 7.

¹⁰ Lins 1974: 504.

¹¹ “Esperanto en Egiptujo” (parolado de Tadros Megalli), en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 7.

¹² Kohen-Cedek 1969: 8. Vd. ankaŭ: J. Kohen-Cedek, “Kritikrikolto”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 5.

¹³ Efektive lia nomo aperas en la Informilo de IEL kiel J.G. Ghandour. Tamen, estas ŝajne la sama homo, ĉar la komenca konsonanto de lia familia nomo estas elparolata kiel voĉa velara frikativo, fonemo, kiu ekzistas arabe sed forestas en Esperanto, kaj estas transskribata en diversaj lingvoj jen kiel R, jen kiel Gh aŭ G. Alia dubo koncernas la inicialon de lia persona nomo: Laŭ Kohen-Cedek (1969: 8), ĝi estas B., ne J.G., sed eblas kredi al la samperioda listo de “Pagintaj PEL-anoj” por 1944-1945, kie ĝi estas J (*Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 2, p. 5).

¹⁴ Oficiala Informilo de IEL, n-ro 161, en: *Esperanto Internacia*, vol. 7, 1943, n-ro 5/6, p. 47.

¹⁵ Oficiala Informilo de IEL, n-ro 174, en: *Esperanto Internacia*, vol. 9, 1945, n-ro 7/8, p. 67.

(en 1944) li restis preskaŭ sen lernantoj, kiam tiuj militistoj estis translokitaj. El grupo de sep, la sola Novzelanda militisto kiu restis en Egiptio, Ross Gordon Robbins (kiu mem antaŭe estis translokita el Palestino)¹⁶, instruadis en klubo por militistoj¹⁷, kaj do Megalli instruis dek fraŭlinojn en la nacia Y.M.C.A.

Prospero

En tiu jaro oni refondis EEA¹⁸, per paroladoj de judo favora al Esperanto, d-ro Cohen, nomumita Honora prezidanto de EEA! D-ro Cohen parolis france, Moussa Helmi el Kairo parolis arabe, kaj Nassif Isaac angle. Pro la klopodoj de la judo Isac Perez, la paroladoj kaj kurso de 12 gejunuloj estis starigitaj en la juda klubejo Cercle Judéo-Egyptien. D-ro Cohen estis direktoro de la Teozofia Societo kaj de Oxford Institute, kio ebligis tie okazigi kurson kaj starigi la ejon de EEA.

Araba-juda agado por Esperanto manifestiĝis, do, kaj ene de ĉiu el la unuopaj asocioj kaj per kunlaboro inter PEL kaj EEA, kiel ni vidos.

Paralele al la supre menciitaj Egiptiaj okazaĵoj, en Jerusalemo la 10/12-an de aprilo 1944 okazis la sesa tutlanda PEL-kunveno, kun pli ol 100 partoprenantoj, inter ili Esperanto- eminentuloj el Egiptio. Iliaj elokventaj diroj dum la kongreso pruvis, ke inter EEA kaj PEL (kiu konsistis ĉefe el judoj) ekzistis nek iaj principaj malkonsentoj, nek ia reciproka malkontento¹⁹. La egiptaj eminentuloj estis Tadros Megalli, kaj ties iamaj disĉiploj Nassif Isaac kaj Nassif Mahrus²⁰.

Megalli estis invitita paroli antaŭ la kongresanoj pri la Esperanto-movado en Egiptio. Li priskribis interalie, kiel li hazarde eksciis, veninte al la nova Esperanto-klubejo, ke la eksprezidanto de la Teozofia Societo (do antaŭulo de d-ro Cohen), Egizio Veronezi, estis inter la plej fruaj pioniroj de la Esperanta movado en Egiptio. En lia libraro li trovis multajn Esperantajn dokumentojn, dank' al kiuj li lernis pri fruaj esperantistoj en Egiptio, kiel la rusa advokato Vilkin kaj s-ro Atkins.

Mahrus, kiu parolis nome de la egiptaj esperantistoj²¹, estis la prezidanto de la Esperanto-grupo en Kairo dum la mondmilitaj jaroj. En artikolo pri "La palestina periodo" lia foto tute nature aperas inter naŭ PEL-pioniroj! Same aperas foto de alia arabo, la juna Jozefo Anastas el Bet-Leĥemo, Palestino²². Komparante tiujn figurojn kun la gravaj aktivuloj tie aperantaj, kiel d-ro Immanuel Olsvanger, N.B. Ĥavkin, Ch.F. Hochhauser-Armoni k.a., eblas havi bildon pri la centra loko de Anastas, des pli de la Egipto Mahrus, en la agado de PEL, almenaŭ en la menso de la verkinto, prof. Kohen-Cedek.

Post la kongreso la egiptaj gastoj vizitis kun Olsvanger tri judajn agrikulturajn loĝlokojn. Reveninte al Egiptio, Megalli aperigis artikolon en la araba revuo *Asyut*, la 10-an de junio 1944: "Vizito al Palestino". En la artikolo li skribas i.a.: "Ni vere admiris la grandiozan laboron faritan de la judoj, kiuj kreis de la roka kaj dezerta tero fekundan kaj fruktodonan teron [...] Vere, estis por ni tre belaj momentoj..."²³

¹⁶ Kohen-Cedek 1969: 7.

¹⁷ *Esperanto Internacia*, vol. 88, 1944, n-ro 7/8, p. 54.

¹⁸ Samloke, n-ro 9/10, p. 71.

¹⁹ J. Kohen-Cedek, "Kritikrikolto", en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 2-3.

²⁰ Vd. noton 11.

²¹ Tadros Megalli, "Vizito al Palestino", en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 20.

²² Kohen-Cedek 1969: 3-6.

²³ Vd. noton 21, p. 20-21.

Kvankam ne ĉio iris glate inter la du asocioj (Kohen-Cedek malklare aludas pri ia “reciproka kritika elpafo”), tamen “ne estis kaŭzita eĉ nebuleto sur la lazurpura ĉielo de la vera interfratiĝo de PEL kaj EEA”²⁴.

Post invito de EEA al PEL partopreni ilian unuan Landan Kongreson, PEL decidis aranĝi ekskurson al Kairo por PEL-anoj kaj por simpatianoj de la movado. Sur la formularo dissendita al la membroj estis skribite:

ni volas ke la ekskurso estu grandsukcesa por konvinki niajn Egiptajn samideanojn ke nia movado en Palestino estas vere vigla. Do, mi esperas ke vi klopodos por la ideo inter viaj samideanoj kaj simpatuloj por ke plejble granda nombro partoprenu.²⁵

Kaj ja, partopreni la unuan Egiptian Kongreson esprimis pretecon 110 (!) personoj el Palestino²⁶. La programo antaŭvidis trajnan vojaĝon, viziton al la piramidoj, diversaj moskeoj kaj sinagogoj, muzeoj kaj ĝardenoj²⁷.

Tamen, ĝi estis “tiel damaĝe haltigita pro vizomanko”, laŭ Kohen-Cedek²⁸. La palestinanoj devis nuligi sian aliĝon, ĉar la britaj aŭtoritatoj ne donis al ili vizon. PEL estis mirakle savita de financa katastrofo post la nuligo (la bilanco montras, ke la perdo sumiĝis je sepoblo de la tiam kotizo por IEL)²⁹, sed la vera perdo kuŝas kompreneble tute aliloke.

La unua Egiptia Esperanto-Kongreso okazis la 15-an kaj 16-an de decembro 1944, do sen la 110 gastoj el Palestino, sed kun salutleteroj de d-ro Olsvanger, prezidanto de PEL, kaj de Hochhauser-Armoni. La PEL-anoj, devigitaj malĉeesti, povis legi artikolon pri la Kongreso en sia *Interna Bulteno*³⁰.

Rilate la estraron elektitan dum la Kongreso, ne eblas miskompreno, kvazaŭ la aktivuloj de EEA estus ĉefe judoj kaj eksterlandanoj, soldatoj kaj aliaj: la estraro estis preskaŭ komplete araba (krom Ernst Lunzer el Aleksandrio): prezidanto A. El Mofti, vicprezidantoj Moussa Helmi, Harfuŝ, Mahrus, sekretario Megalli, k.a.³¹

PROEL

En 1944 maturis la grundo por la ideo fondi “en la nuna aŭtuno” Proksim-Oriantan Esperanto-Ligon (PROEL). La iniciatinto, Natan Ben-Cion Ĥavkin el Jerusalemo, proponis kiel portempan sekretarion s-ron Megalli el Egiptio; en la revuo *Esperanto Internacia* esprimiĝis lia espero, “ke ĉiuj samideanoj en la Proksima Oriento kaj Nord-Afriko interrilatos kun li”³². Ĥavkin celis ĉefe la taskon propagandi Esperanton inter la arablingvanoj, kun sidejo en Kairo kaj kun laŭstatute difinitaj personoj kiel estraranoj. Oni planis la unuan renkontiĝon de PROEL por decembro 1944 en Kairo. Kaj PEL kaj EEA informis pri tio aparte al IEL. Ambaŭ asocioj jam petis subtenon de IEL, sed la respondo estis, ke jam ekzistas “ŝlosiloj” judaj kaj arabaj kaj ke plia helpo povos esti traktata de la Estraro nur post la milito³³.

²⁴ J. Kohen-Cedek, “Kritikrikolto”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 3.

²⁵ Ekskurso al Egiptujo – dokumento (1-9-1944) el la arĥivo de E.L.I.

²⁶ Vd. noton 24.

²⁷ Vd. noton 25.

²⁸ Vd. noton 24.

²⁹ “Bilancio je la 31.12.44”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 2, p. 6.

³⁰ “La unua Egipta Esperanto-Kongreso”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 1, p. 18-19.

³¹ Cetere, almenaŭ en junio 1945 IEL anoncis pri kvin novaj delegitoj kaj fakdelegitoj portantaj pure arabajn nomojn: N. Ayac, J. Sabbah, Amin Abd el Aziz, Munir Tawil kaj Atalla Hanna (Oficiala Informilo de IEL, n-ro 174, en: *Esperanto Internacia*, vol. 9, 1945, n-ro 7/8, p. 67).

³² *Esperanto Internacia*, vol. 8, 1944, n-ro 9/10, p. 71.

³³ Letero el la arĥivo de UEA. Komplete de Ziko M. Sikosek.

Tamen, Kohen-Cedek kontraŭis, ne la ideon, sed ĝian efektiveblecon. En akra kritika artikolo li argumentis, ke kvankam la celoj kaj taskoj de ambaŭ asocioj, nome, disvastigi la scion pri la Esperantaj idealo kaj movado, estas tute identaj, ekzistas teknikaj baroj, kaj krome komuna organizo ne necesas, ĉar la landaj asocioj jam okupiĝas pri propagando. Li starigis retorikajn demandojn kiel: Kie estu la sidloko de la komitato, ĉu en Kairo, ĉu en Jerusalemo? Kiu prezidu la kunsidojn? Kiamaniere oni aranĝu la elektojn de la Estraro? Kial aktivulo devas partopreni la laboron de kvar organizoj: sia urba grupo, landa asocio, nova interlanda PROEL, kaj la internacia IEL? Tio nur signifus senrezulte dispolvigi la energion de ĉiu membro. Kohen-Cedek resume deklaris, ke la afero estas nerealigebla, estante sensencaja absurdo.

Anstataŭe Kohen-Cedek proponis en sia artikolo, ke ambaŭ centraj komitatoj, de EEA kaj de PEL, foje renkontiĝu ie por fondi komunan ag-ordon kaj difinu laborplanon, ke ambaŭ centraj komitatoj starigu komunan Oficejon, kiu preparu la eblon kunvoki en la Proksima Oriento Universalan Kongreson; la sidejo de la Oficejo estu laŭvice po du jaroj en ĉiu ĉefurbo. Krome, la Oficejo eldonu komunan bultenon; la palestinan parton redaktu PEL-ano, kaj la egiptan EEA-ano³⁴.

Inter Kohen-Cedek kaj la de li admirata, 30-jarojn pli aĝa, Ĥavkin, portempe estis streĉo, rezulte de malkonsento inter la du pioniroj. La projekto elvokis “ŝercriproĉojn” flanke de Kohen-Cedek, rilate al Ĥavkin. Ĥavkin nur ridetis, dum en Kairo oni verŝajne seniluziĝis³⁵.

Post tiu polemiko, la nomo PROEL estas nenie plu dokumentita.

La vaste legata hebrea ĵurnalo *Ha'arec* raportis pri la Kongreso de Palestina Esperanto-Ligo en Jerusalemo, la 1-an kaj 2-an de aprilo 1945, i.a. pri la ĉeesto de 40 delegitoj el la tuta lando, “judoj kaj araboj”. Ĝi ankaŭ menciis saluton nome de la egiptaj esperantistoj, fare de pola gasto el Egiptio³⁶. Tiu estis la pol-armea majoro Roman Fiedorowicz. Li portis publike salutojn de amikoj, kiuj ne povis veni: Nassif Mahrus, Megalli kaj Nassif Isaac, kaj de diversnaciaj soldatoj servantaj en Egiptio. Fine li parolis pri granda sukceso de EEA, nome la starigo de amikaj rilatoj inter la Mezoriantaj esperantistoj³⁷.

Estis laŭtlegataj salutleteroj, i.a. oficiala letero de EEA, kaj de N. Mahrus el Egiptio³⁸.

Anastas³⁹ estis inter la salutantoj de la Kongreso, kaj parolis “nome de la Arabaj Esperantistoj”, kiel li diris. Poste li estis elektita vicprezidanto por Bet-Leĥemo, kiel unu el kvar vicprezidantoj⁴⁰.

La kongreso faris decidon, kiu postulis kunvoki la unuan postmilitan Universalan Kongreson en Jerusalemo⁴¹. Temas ja pri urbo sankta kaj por judoj kaj por araboj, kun tiam pli-malpli egala loĝantaro el la du popoloj. Efektive, la propono al IEL estis farita *ripete*. Tion pruvas rifuzletero de IEL jam de septembro de la antaŭa jaro 1944, kiu enhavas la argumenton, ke la unua postmilita UK devos esti en lando kiel eble plej centra en

³⁴ Vd. noton 24.

³⁵ Vd. noton 24.

³⁶ “La Kongreso de la Esperanto-Ligo de Palestino” (hebrelingva, neindikita ĵurnalisto), *Ha'arec*, 5-4-1945. Komplete de la Cionisma Arĥivo en Jerusalemo.

³⁷ “S-ro Roman Fiedorowicz, pol-armea majoro el Aleksandrio salutis”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 3, p.2.

³⁸ *Interna Bulteno*, vol.3, 1945, n-ro 3, p.8.

³⁹ Li ne indikas sian antaŭnomon. Ni scias pri almenaŭ du esperantistoj Anastas en Bet-Leĥemo: unu estas Jozefo Anastas, kaj laŭ la Jarlibro de IEL 1947, p.191, ekzistis ankaŭ A.G. Anastas. La tabelo de pagintaj PEL-anoj montras ke dum 1944 estis krom J. Anastas, J.A. Anastas, sed tiu lasta en 1945 ne plu estis membro (*Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 2, p.5).

⁴⁰ “Elektoj”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 3, p.20.

⁴¹ Vd. noton 36.

Eŭropo⁴². Menciindas, ke sugesto kunvoki UK-on en Jerusalemo estis farita jam en 1926 (!) dum la Edinburga UK, fare de Olsvanger. La sugesto akceptiĝis “kun granda intereso kaj entuziasmo”, laŭ anglalingva gazetara komuniko, dissendita al la brita gazetaro far la cionisma organizo *Keren Hajesod*⁴³.

La Dua Egipta Esperanto-Kongreso okazis la 15-an kaj 16-an de decembro 1945, en la Nacia Y.M.C.A., Kairo. En foto akompananta la raporton en *Esperanto Internacia* videblas ĉ. 50 esperantistoj, inkluzive infanojn. La programon, kiu enhavis teatraĵojn kaj ekskurson al la piramidoj, ĝuis ankaŭ gasto el Palestino, la judino Lea Rousseau⁴⁴.

Gastoj vojaĝadis ankaŭ en la inversa direkto: Komence de 1945 venis al Jerusalemo Mahrus el Fayoum, Egiptio. Ges-roj Tejtjel aranĝis por li gastakcepton, kun preskaŭ ĉiuj esperantistoj de Jerusalemo⁴⁵.

Ĝis la fino de la Dua Mondmilito, la Mezoriantaj esperantistoj havis aliajn zorgojn ol diskuti pri la regiona interetna konflikto. Nur post la fino de la mondmilito en la Esperanta gazetaro troveblas eĥoj je la konflikto. En oktobro 1945 Eliezer Wurzel el Palestino skribas al fora Meksikio:

[...] la popoloj de Proksima Oriento jam ekreviĝis [tiel] de ĝia letargio [tiel], kaj postulas sian rajton kiel popoloj kaj kiel homoj. Persujo, Irakujo, Sirio, Egiptujo, postulas ke ĉiuj soldatoj de fremdaj registaroj forlasos [tiel] ilin, kaj ili mem volas regi sen fremduloj; [...] sed la situacio estas katastrofa: la araboj kontraŭ la judoj, la judoj kontraŭ araboj, kaj Britujo kontraŭ ili ambaŭ. [...] kio okazos? Ĉu denove ni donos nian vivon senkulpe? Ĉu denove regos en la mondo la morto kaj la sango? Pro kio silentas la mondo?⁴⁶

Kapitano M.H. Robinson el Anglio estas pli aludema: “Mi ne deziras polemiki per tiu ĉi artikoleto ion rilate al la situacio politika de la Jud-Araba malkonkordo [...], mi nur volas priskribi miajn impresojn, vizitante kolektivon kolonion Hebrean (“KIBUCO”)⁴⁷.

Finiĝis la esperantista tabuo koncerne la regionan, baldaŭ kulminiĝontan konflikton. Venis nova tempo.

La fino

Post la milito de 1948/49, sekve de la milito, homperdoj, kaj foriro de eksterlandaj soldatoj, ambaŭ PEL kaj EEA suferis konsiderindan malfortiĝon. Pri PEL skribis Josef Kohen-Cedek: “Nur en aŭtuno 1949 ni denove kunvenis en Tel Aviv por prikalkuli niajn homperdojn, kuraci la vundojn kaj restarigi nian landmovadon.”⁴⁸

Tamen, dum por EEA la milito signifis mortobaton, PEL, kiu alinomiĝis je Esperanto-Ligo Israela (ELI) post la fondiĝo de la juda ŝtato Israelo en majo 1948, daŭre evoluis, precipe danke al la vasta enmigrado de judaj esperantistoj ĉefe el Eŭropo. Tiun avantaĝon ne ĝuis EEA, kiu en 1951 haltis⁴⁹, eligante tamen lastan sterton per registrado de iu “Mezorianta Esperanto-Federacio” ĉe la Ministerio pri Socialaj Aferoj⁵⁰.

⁴² Vd. noton 33.

⁴³ La gazetara komuniko estas komplezo de la Cionisma Arĥivo en Jerusalemo. Ĝi datas de 8-8-1926.

⁴⁴ “El Egiptujo”, en: *Esperanto Internacia*, vol. 10, 1946, n-ro 3, p.34-35.

⁴⁵ “Novaĵoj”, en: *Interna Bulteno*, vol. 3, 1945, n-ro 3, p. 23.

⁴⁶ Eliezer Wurzel, “Palestino kaj la Proksima Oriento”, en: *Renovigo* (Meksiko), vol. 12, 1946, n-ro 74 (januaro), p. 12.

⁴⁷ M.H. Robinson, “Militisto rigardas kolektivon kolonion Palestinan”, en: *Esperanto Internacia*, vol. 9, 1945, n-ro 11/12, p.93.

⁴⁸ Kohen-Cedek 1969: 8.

⁴⁹ Lins 1974: 504.

⁵⁰ Heidi Goes, *De Esperanto-beweging in Afrika* (licencia verko en la nederlanda, Universitato de Gent, 1998/99), legeblas ankaŭ interrete en: <http://cas1.elis.ugent.be/avrug/pdf06/thesis06.pdf>.

Kvankam anonima intervjuito al hebrea gazeto asertis en oktobro 1952, ke en Egiptio daŭre estas aktiva Esperanto-asocio, la sama intervjuito konfesis: “Antaŭe estis fortaj amikecaj kontaktoj inter la du asocioj [Palestina kaj Egiptia], sed tiuj ĉesis kun la komenco de la milito. En Bet-Leĥemo troviĝas ĝis hodiaŭ ‘delegito’, nome gvidanto de Esperantista ‘filio’ kiu ... ne ekzistas”⁵¹.

Certe la fermita limo inter la nun malamikaj landoj, malpliigis al la restintaj izolitaj egiptaj esperantistoj la eblon praktiki sian lingvon. Trajne vojaĝi el Kairo al Tel-Avivo aŭ Jerusalemo, kio antaŭe estis relative facila kaj tiom kutima, kaj kio povus kompensi la maleston de proksime loĝantaj esperantistoj, iĝis post majo 1948 malebla. Evidente Esperanton en Egiptio neniel helpis la ŝanĝiĝanta reĝimo en 1952 post la t.n. “oficira revolucio”, kiu kaŭzis sociajn ŝanĝojn, ĉefe rilate al la kleraj tavoloj, kaj foriradon de eksterlandanoj.

Laŭ Lins, Nassif Isaac estis longtempe la sola araba delegito dum Universalaj Kongresoj⁵², sed ankaŭ la maljuna Megalli (kiu dume jam dividadis sian vivon inter Egiptio kaj Germanio⁵³), renkontadis ELI-anojn dum UK-oj en la okdekaj jaroj⁵⁴. La alternativan IJK en Israelo (1967) vizitis grupo ĉe Anastas⁵⁵. Ankoraŭ en 1979 israela junulo rakontis pri la gastamo, kiun iam li ricevis ĉe araba samideano en Bet-Leĥemo⁵⁶. Sed tio estis verŝajne la lasta restaĵo de la erao ĝis 1948. Dum la jaroj estis ja hazardaj renkontoj de arabaj kaj judaj esperantistoj en UK kaj IJK, sed estis sporadaj, kaj certe ne reprezentis konstantan kunlaboron kiel iame.

Epilogo

Decido de la landa jarkonferenco de ELI (de la 15-a de aprilo 1979) tekstas:

La israelaj esperantistoj, kiuj [...] opinias, ke la Internacia Lingvo estas unu el la plej valoraj instrumentoj por semi kaj proksimigi la veran humanan pacon inter diversaj homoj kaj nacioj, deklaras kun kontento kaj ĝojo, ke ili bonvenigas la subskribon de la paca traktato inter Israelo kaj Egiptio.⁵⁷

Kelkajn monatojn poste, la prezidanto de ELI, Aleksander Manor, kaj sekretario Jeraĥmiel Giladi ricevis leteron el la buroo de ĉefministro Menaĥem Begin:

Bonvole akceptu la elkoran dankon de la ĉefministro pro la gratuloj, okaze de la decido aljuĝi al li la Pacan Nobelpremion, kune kun la prezidento Sadat.

S-ro Begin kredas, ke la vera premio estas la Paco mem. Ni daŭrigos penadi por ĝin akiri.⁵⁸

Ĉu tio ĉi signifas, ke la paco ne bezonas Esperanton por efektivigi?

La aŭtoro de ĉi-linioj ne konsentas kun tiu ĉi hipotezo. Packontrakto estas nur skeleto. Estas la homaj rilatoj, kiuj animas la pacon, kaj Esperanto liveris vivan ekzemplon de fortaj amikaj rilatoj, jardekojn antaŭ la packontrakto, en la jaroj 1924-1948.

⁵¹ Refael Baŝan, “50% el la Esperanto-parolantoj estas virinoj” (hebrelingva raportaĵo okaze de la 3-a tutlanda kunveno de E.L.I. en Hajfa). Eltiraĵo el neindikita gazeto, 9-10-1952, kompleze de la Cionisma Arĥivo en Jerusalemo.

⁵² Vd. noton 49.

⁵³ Megalli ekde la kvindekaj jaroj vivis en suda Germanio.

⁵⁴ Laŭ foto el la postlasaĵo de J. Giladi, kaj persona komuniko de J. Tilleman.

⁵⁵ Persona komuniko de Josef Ŝemer.

⁵⁶ Blonŝtejn, Naĥum [subskribinta kiel N.B.], “Gastamo”, en: *Israela Esperantisto*, 1979, n-ro 68, p. 14.

⁵⁷ “Decido de la Landa Jarkonferenco de Esperanto-Ligo en Israelo”, en: *Israela Esperantisto*, 1979, n-ro 68, p. 3.

⁵⁸ “Dankletero de la ĉefministro”, en: *Israela Esperantisto*, 1979, n-ro 68, p. 4.



Meze de 1944 en la 6-a Palestina Esperanto-Kongreso en Jerusalemo partoprenis ankaŭ esperantistoj el Egiptio. Precize 64 jarojn poste en Amano okazis la 1-a Mezorianta Esperanto-Kunveno.

... kaj rekomenco?

Post preskaŭ 60 jaroj sen arabaj membroj en ELI, Esperanton lastatempe eklernis tri israelaj araboj, inter kiuj estas du studentoj, kiuj de tempo al tempo partoprenas junularajn renkontiĝojn.

Verkinte la artikolon, mi ne sciis, ke baldaŭ, en aprilo 2008, mi mem ĉeestos historian eventon, kiu estis trafa rekomenco: la tritagan Unuan Mezoriantan Kunvenon en Amano. Ĝin organizis la jordanian studentino Hind Ĥusejn, Tom Juval el Israelo kaj Renato Corsetti. Partoprenis en ĝi la tri jordaniaj esperantistoj, kiuj estas konataj al la movado, esperantista familio el Dubajo kaj triopo el Turkujo, tri eŭropanoj kaj iom granda israela grupo (pli ol 10). Kunveneto modesta sed enhave riĉa, gaja kaj promesplena, kun du omaĝoj al la bela periodo 1924-1948: tiu ĉi artikolo servis kiel bazo de prelego en la unua horo de la kunveno, kaj dum la tuttaga ekskurso, en inspirita ago, oni per komuna festa foto intence “restarigis” imite la historian foton de la kunveno en 1944, Jerusalemo, de la juda grupo kun egiptaj gastoj, post kiam malkovriĝis la simbola fakto, ke la du eventoj okazis precize en la samaj datoj, je distanco de 64 jaroj!

Komence de aprilo 2009 oni organizis la Duan Mezoriantan Kunvenon en Ĥznik, Turkio⁵⁹. Ĝi havis proks. 40 partoprenantojn, inter kiuj estis kvar israelanoj, sed neniuj araboj.

Entreprenemaj esperantistoj el la mondo povus persone dediĉi sin al la paco pere de Esperanto, se ili pionire instruus Esperanton en la Mezoriantaj landoj, kiel faradis iliaj kolegoj en la komenco de la 20-a jarcento.

Bibliografio

- Kohen-Cedek, Josef (1969): “La Palestina periodo”. En: *Nia Ligilo*, n-ro 30, kol. 3-8.
 — (1976): *Natan Ben-Cion Ĥavkin: Ekzemplo de homa vivo*. Tel-Avivo: E.L.I.
 Lins, Ulrich (1974): “Landaj organizaĵoj por disvastigo de Esperanto”. En: Ivo Lapenna (ĉefred.), *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*. London, Rotterdam: CED/UEA.
 Manor, Aleksander (1978): “El la historio de nia Esperanto-movado”. En: *Israela Esperantisto*, n-ro 66, p. 1-3.

Tiu ĉi verko estas dediĉita al la araboj kaj judoj, kiuj pionire, naive kaj pacreve praktikis la esencon de Esperanto.

Doron Modan

Nask. 1971. Muziko-komponisto. Laboras en la sfero de fonetiko en teknologio. Doktorigas pri fonetiko. Redaktoro de *Israela Esperantisto*, 2001-2008.

⁵⁹ Vd. la raporton de Renato Corsetti, en: *Esperanto*, vol. 102, 2009, n-ro 5, p. 116.